

Boulogne sur Mer
31, Boulevard Mariette
27^{an} Sept. 1924
15h 30

Kara amiko,

Kia bona surprizo! ricevi leteron de vi tiel rapide. Mi tute ne estas al kutimita al tio, precipe de du lastaj jaroj.

Mi sincere dankas vin pri via afabla letero kiu ĝojigas min. Ĉu estas necese iri al Kongreso + apenaŭ sin vidi, apenaŭ paroli kune kun, por ke vi skribu pli ofte? Se estas tiele, ni iros al la Svisa Kongreso + ni salutos unu la alian tra la Kongresejo + estos tute. Eble poste, vi skribos multege al mi + tre ofte! Kio ajn estas, mi dankas vin por viaj leteroj kiuj aldoniĝis al la 30 aliaj, ĉar "mon pauvre ami" vi estas tre malproksime de 130 leteroj en 6 jaroj. Vi skribis 32 en 4 jaroj !!! Via unua estas datita 1^a Okt. 1920, + via lasta estas via 32^a!!! Sed, mi laŭdas vian intencon + nur ĝojus se ĝi efektiviĝus sed, tion mi ne kredas.

Do, jen vi juniĝis!!! jen vi estas 28 jara. Sed, ĉu vi kredas ke la veraj junuloj konsiderus vin kiel junulon? Ĉu vi kredas ke nur la tango, la shimmy plijunigas? Mi kredas ke la karaktero, la animstato, la sano, la interna kontenteco junigas + ne estas bezono danci la tangon por atingi tiun impreson de memjuneco.

Feliĉe por vi ke vi ne vivas en norda Francujo kie preskaŭ nur la junaĝaj personoj dancas. Estas, laŭ mi ridinda kutimo, + mi ĝojas en Parizo + en aliaj landoj kiam ĉiuj povas danci sen ke oni ridu. Ĉi-tie, homoj devas esti tre belaj, tre mondanaj, tre maldikaj, tre "sveltes" tre "chics" por ke oni ne moku pri ili kiam ili dancas ...

Francoj kutime estas mokemaj + tre malfacile kontentigitaj. Do, gratuligu ke vi estas en Pŕelouč + povas lerni la nigrulajn dancojn sen ke viaj najbaroj ridu.

Mi malbone konas tiujn dancojn + nevolonte dancas ilin - ĉar nun, oni ne plu nomas ilin tiele + ili estas tute ŝanĝitaj. Ĉiuj 3 monatoj ili ŝanĝiĝas + la tango kiun mi lernis antaŭ 3 jaroj tute ne similas al la nuna. Same por la foxtrot k.t.p. Feliĉe ke la Pŕelouĉanoj ne estas tiel malfacile kontentigitaj.

Mi ĝojas pri via frazo pri la Svisa Kongreso, ĉar mi vidas tiele ke vi intencas ĉeesti ĝin. Eĉ se vi nur salutos min el proksime, mi diros ke tio estos promeso de pli oftaj leteroj. Eble estos pli bone. Vidu: mi vidis D^{ron} Broder en Salzburg + Wien, la tutan tempon, + mi nur ricevis unu leteron + unu P.K. Mi vidis vin eble dum unu horo aŭ du + ne povis preskaŭ babiladi, ĉar mi ne estis sola kun vi + mi jam ricevis du leterojn. Ĉu la kongresa interkonatiĝo detruus la Esp. korespondadon? Mi nur ŝercas vi bone scias, ĉu ne?

Pri la nekulturitaj Poloj pri kiuj vi skribas, mi scias ke estas terura stato de aferoj en tiu malfeliĉa lando. Jam, kiam mi estis en Galicio, mi spertis tion, eĉ en la privataj domoj kies mastroj estis ŝajne kulturitaj + intelektaj. Tamen, mi kredas ke ili estos pli feliĉaj se ili estus klerigitaj. Kaj la veraj inteligentuloj estas terure kulturitaj - preskaŭ tro + ili suferas multege, pli ol ordinaraj inteligentuloj. Kaj ili pro tio estas tre delikatigitaj ("raffinés" ni diras france) + tre komplikitaj mense.

Estas vera ĉarmo koni ilin aŭ estas vera doloro, laŭ la cirkonstancoj. Estas domaĝe ke ĉe ili, nur estas "elektitaĵoj" aŭ "malklerigituloj"- ĉu vi komprenas min? Estus pli bone ke ili estu iom pli samniveligitaj anstataŭ ol tiuj tiel profunde inteligentuloj + tiuj kamparanoj ne sciante eĉ skribi

¹ manskribita noto: doŝlo 30/9 24

siajn subskribojn. Kio ajn estas, mi kredas ke Poloj ne facile ŝanĝiĝos + ni devos akcepti ilin tiel kiel ili estas: kun ĉiuj iliaj ecoj + ĉiuj iliaj pekoj aŭ malecoj.

Vi skribis en via antaŭa lasta letero ke vi miris kiam vi loĝis ĉe ili en Galicio ke ili ne amis Ĉekojn, sed, ĉu ne estis tute kompreneble: vi, dum milito, loĝis ĉe malamikoj, se mi ne eraras. Kiel povis esti alie?

Kiam via Tribunalo malferiĝos post la libertempoj? Oficiale ĉi-tie estos la 2^{an} de Oktobro post 2 monatoj da libertempo. Sed nature, la kriminalaj aferoj, la paca juĝejo (justice de paix) kies mia edzo estas honoreca juĝisto, komerca juĝejo k.t.p funkcias tamen ĉiu semajne + mia edzo ŝajnas labori tiom kiom dum la veraj laborantaj monatoj.

La 6^{an} de Okt. okazas la ĉiujara kunveno de la advokatoj + de la juĝistaro. La advokatoj voĉdonas por ilia ĉefo de la ordeno (ne, tiu vorto ne taŭgas, kiel mi povus diri: eble "fratularo" en franca lingvo, estas "l'ordre des avocats" + ĉiu jare oni elektas la: "bâtonnier" + "la konsilantaron" por unu jaro).

Vespere okazas la ĉiujara festeno en unu el la plej belaj hoteloj. Tiun vesperon, mi ofte profitas por iri teatron aŭ mi skribas longe al korespondantoj. Estas tre malofte por mi, esti sola vespere.

Dimanĉe, ni ĉiam kutimiĝas iri al la golfludejo. Kiam mi ne estas tro laca aŭ kiam la vento ne blovegas tro forte, mi ludas. Kutime posta la tagmanĝo apud la maro, mi supreniras la krutaĵon + sidas sur roko apud la marbordo + revas, legas aŭ skribas. Mi multege ŝatas ludi, sed mi neniam povas tramarŝi la tutan golfludejon - estas preskaŭ 10 kilometroj kun 18 truoj - ludante estas tre lacigante.

Hodiaŭ posttagmeze estas belega vetero, kvankam matene pluvegis (ĉiam pluvas tiun-ĉi someron) + mi eliris sen pluvombrelo!!!

Mi pripensos al vi dimanĉon vespere, dancante + mense, mi revidos vin en la Praha balo. Ĉiuj detaloj de tiu balo estas kvazaŭ ili okazis hieraŭ, impresigitaj en mia menso!!!

Nun, mi ne plu volas tedi vin pro la troeco de mia letero + dankante vin de nove por la via, mi atentos de vi trian leteron dum via skribfebrego daŭras.

Salutante vian edzinon, mi transdonos al vi vian² saluton + sendas miajn amikajn + samideanajn pensojn.

Alice Sergeant